# *Avancas procezo pri salajraltigo en Kubo*



Havano, 23 jul (RHK) Oni devis aktualigi pli ol 60 jurajn normojn por ekfunkciigi la decidon de la registaro altigi la salajrojn de la subvenciata sektoro kaj la kvanton de la pensioj sub 500 pesoj, precizigis la ministrino pri laboro kaj socia sekureco, Margarita González en la televida programo Ronda Tablo.

La ministrino, kiu estis akompanata de la vicministrino pri financoj kaj prezoj, Lourdes Rodríguez, klarigis pri la tuta laboro farita de grupo de organismoj de la centra ?tata administracio kaj aliaj institucioj, kiuj entreprenis tiun ?i renovigon.

Per la nuna decido, asertis la funkciulino, oni celas meti la subvenciatan sektoron en saman kondi?on kun aliaj, ?is la limo ebla, kaj reemfazis ke la bonfaroj ampleksas ?iujn laboristojn en tiu sektoro.

?i aldonis ke la ?efa koncepto de tiu ?i salajraltigo estas multobligi la bazan salajron, tiel ke la aldonaj pagoj estis decidoj partaj en konkretaj momentoj pro specifaj cirkonstancoj. Estis justaj decidoj kaj kontribuis subteni sektorojn kies laborforto estis deficita, kaj pro tio oni ne forigos tiujn pagojn, sed ja organizas la salajrojn.

Oni celas profitigi ?efe tiujn kiuj ne forlasis tiun sektoron, spite al ne ricevi salajraltigojn ekde la jaro 2005, kio provokis seriozajn problemojn, interalie, la formovi?on de multaj laboristoj al aliaj sektoroj

pli profitdonaj.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/196893-avancas-procezo-pri-salajraltigo-en-kubo

**Radio Habana Cuba**